

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Juli-Aug. 1946

34 årg. Nr 7-8

ORGAN FOR SVENSKA ESPERANTO-FORBUNDET

LA JUBILEA KONGRESO DE SEF 1946

La pentekostajn festotagojn Sveda Esperanto-Federacio laŭ tradicio dediĉis al sia jarkunveno. Oni renkontiĝis la pentekostan sabaton en Uddevalla, interkonatiĝis ĉe akcepta festo la saman vesperon, kaj poste dum la tuta pentekosta tago ni tralaboris la jarkunvenprogramon. La pentekostan lundon atendis nin aliaj taskoj, kiuj estas la loto de esperantistoj.

— Do ĉio laŭ konata skemo? — Jes, ĉiam ĉe la jarkunvenoj de SEF, sed ĉiujare aliĝas io nova, ĉar ĉiujare estas novaj aranĝantoj, kiuj gvidas la laboron, kaj ĉiu loko havas siajn specialaĵojn kaj specialistojn, kiuj enverŝas novan vinon en la malnovajn ujojn.

Detta nummer och nästa

Detta nummer är ett dubbelnummer, som ger redaktion och läsekrets en semestermånad. Nästa nr av *Espero* är avsett att utkomma först den 5 september och dess redigering avslutas den 27 augusti. Det skall bli ett propagandanummer för höstens esperanto-studier, och måste därför huvudsakligen bli på svenska.


Vi räkna på ett större antal bidrag än vanligt och önska i första hand sådana, som i korta drag angiva någon talande synpunkt på esperanto eller ge besked om något fall, då esperanto kommit i praktisk användning, eller med andra ord, vi vänta artiklar (på svenska) lämpade att göra tjänst i ett propagandanummer.

Förlaget, som sköter den ekonomiska sidan av saken, meddelar, att september-numret av *Espero* kommer att säljas till klubbarna (för vidare distribution) mot 15 öre pr styck, och mot 12 öre pr styck vid rekvisition av 100 ex. eller mera.

Klubbstyrelserna nödgas därför samlas även en gång i augusti för att överväga, hur stor upplaga av septembernumret, som bör rekvideras för klubbens räkning. Samt för att insända rekvisitionen till Förlagsföreningen Esperanto, box 190 71, Stockholm 19, senast den 27 augusti.

Klubbstyrelsens och författares semester blir alltså inte fullständig, men det kan nu inte hjälpas...

Red.



Bohusgården salutas per flirtantaj flagoj.

Tiel okazis ankaŭ en Uddevalla.

Tie estis unue Einar Dahl, gvidanto de ĉiuj aranĝoj, kaj tie estis — Bohusgården. Kaj plue ni ekhavis du aliajn veftojn en la teksaĵo, kiuj en alta grado influis la laboron. La unua estis la vetero, kiu retenis ĉiujn kaj ĉiun interne de la domo dum la tuta kongrestago, kaj due levis sin sinjoro Einar Hult el Arvika kaj postulis Esperanton kiel solan kongreslingvon — kaj li en momento konsentigis kun si la jarkunvenon.

Sinjoro Dahl kaj Bohusgården povus postuli ĉiu sian ĉapitron, sed tiel bone konata estas la unua ke oni nur bezonas mencii, ke li estis en altformo, de kiam li salutis nin kaj la eminentulojn bonvenaj, ĝis ni adiaŭis Uddevalla. — De kie tiu homo prenas sian tempon kaj siajn fortojn? Jes, li havis stabon da elektitaj kunlaborantoj, kaj tio ja klarigas iom, sed apenaŭ ĉion.

La poste nomita, t. e. Bohusgården, estis kongresloko, kies similaĵon SEF neniam havis ĝis nun. Imagu al vi blankan kastelon sur unu el la Bohus-rokoj, verdanta flanke de Svedujo kaj kolere griza eksteren al Kattegatt, ambaŭ de ioma distanco. Plue imagu al vi en tiu kastelo teretaĝon kun grandega salono por manĝo kaj refreŝaĵoj, kiel ankaŭ mastrumaj ĉambroj, kaj super tio ankoraŭ pli grandan kongressalonon kun rava elvidaĵo al golfoj, promotoroj kaj urbo. Kaj sur la alia flanko de la spaca ŝtuparejo, kiu kunligas tiujn salonojn, jen hotelo en du etaĝoj kun dormĉambroj por du aŭ kvar personoj. La tuta jarkunveno ja apenaŭ povis havi lokon tie, sed multo ne mankis.

Ĉio estis simpla, neniu nenecesa brilaĵo, sed detale



Mezgrupo en la kongresalono. En la antaŭa vico ni rekonas de maldekstre f-inon Noll kaj s-ron Szilágyi kaj inter ili du kantistinojn. Malantaŭ ili sidas s-roj Jansson el Borlänge kaj s-ro Jookinen el Finnlando. Inter ili tri malnovaj esperantistinoj el Kungsgården kaj Klippan. Meze en la fono nia federacia prezidanto prenis lokon.

La debato tamen vigligis ĉar oni ja ĉi tie staris antaŭ la granda problemo de la federacio: la disvastigo de Esperanto inter novaj generacioj.

S-ro Karlsson, TJO, ne volis havi specialajn statutojn por la junularo, sed ĉiuj ja deziris havi la gejunulojn en la movado. Unue la junularo, poste la statutoj.

S-ro Szilágyi avertis ke ni ne nur pensu al la popol-lernejo, ankaŭ la gimnazioj devus esti kampo por prilaboro, sed la metodoj ĉi-okaze estu aliaj. Iom da seriozeco, ĉar tia estas la karaktero de ties junuloj.

S-ro Dahl opiniis, ke infankursoj estas la sola vojo al renovigo grandskale. Oni brave laboras sur tiu vojo tie kaj tie ĉi, sed mankas komuna plano. Forlasu la proponon de la estraro kaj donu al ni planon por la junular-laboro.

S-ro Åberg: Ni ne estas tiel malbone armitaj. Ni havas la novan lernolibron por infanoj de s-ro Dahl, kaj ni havas la liston de s-ro Svantesson de instruistoj, kapablaj instrui esperanton. Ilia nombro estas tro malgranda, kaj ilia kuraĝo ne granda. Sed pli bone ol atendi instruistojn, vi mem ekagu!

S-ro Malmgren prezentis deklaron, ke la estraro sur sia programo havas la demandon interesigi la skoltojn por esperanto. Bonega estas la okazo nun, kiam la unua mondjamboreo post la milito estas okazonta en Normandio 1947. Ke oni ĝis tiam faru esperante parolantan grupon da svedaj skoltoj, estus por ni granda celo.

S-ro Karlsson eniris denove en la batalon. Li ne volis havi junular-organizon subigitan sub SEF. La Sveda Esperanto-Gazeto ne estas skribita por la junuloj.

S-ro Svantesson atentigis pri tio, ke oni ĉi-tie havas du problemojn, unu por tiuj, kiuj serĉas plezuron kaj unu por tiuj, kiuj emas studi. Ni devas pritrakti ilin malsam-maniere kaj ni devas agi laŭ tio.

S-ro Norling havis la senton ke la kontraŭ-staro venkota de la instruistoj ne ĉie estas same forta. Kie ĝi estas malforta, tie la federacio devas fari helplaboron, ekzemple sammaniere kiel oni faris en Skövde, kie la gazetoj interesigis. Li ankaŭ atentigis pri la skoltendaro en Gränsö en julio, kiujn ni devas observi kaj utiligi.

Fraŭlino Noll sciigis ke la infankursoj en Danlando estis 3-maniere utiligataj 1) por varbi profesiajn instruistojn, 2) por montri la valoron de esperanto je la lernado de la propra lingvo, 3) por fari reklamon inter aŭtoritatuloj.

Si opiniis ke infankursoj ne devas esti tro longaj kaj ke ili prefere konduku al malgranda finfesto.

S-ro Julin demandis: Kion ni aliaj faru por helpi al la instruistoj?

S-ro Dahl, kiu poste ekparolis, rakontis pri sia laboro kiel instruisto inter la junularo kaj respondis al la ĵusa demando: La helpo, kiun ni bezonas, estas plano, valora en la tuta lando.

S-ro Lindén: La junular-organizo ja povas komenci per dekreto por la estraro, kiu je bezono alvoku spertulojn, kiam la tempo estos matura.

S-ro Dupuis menciis la atenditan skoltjamboreon en Normandio kaj rakontis pri la artaj (muzikaj k. s.) kunestadoj, kie oni sukcesis kolekti francajn gejunulojn kaj kie oni tiel dirite parenteze povis fari reklamon por esperanto.

S-roj Bonander kaj Leijder volis ke oni lasu la klubojn organizi la junular-laboron.

S-roj Eriksson kaj Åberg parolis por la propono de la federacia estraro.

S-ro Tobiasson, Göteborg: Kial ni renkontas kontraŭstaron ĉiuloke? SLEA, kiu per esperanto povas oferi al siaj fak-asocioj tiel racion helpon ankaŭ ne trovas aŭskultantojn. La taga preso estas nia ĉiama kontraŭulo, kiel ankaŭ la radio, kaj tamen ni devas iri tiun vojon. La tagpreson ni devas la unuan konkeri. La vojo tra la lernejoj estas tro longa. Ĉu ni ne certigu al ni ABF?

S-ro Szilágyi parolis por aprobo de ambaŭ proponoj tiu de la federacio kaj tiu de s-ro Dahl.

Post tute kompleta planskizo de s-ro Kihlberg la propono de la federacio estis aprobata, kaj laŭ propono de s-ro Leijder oni komisiis al komitato ellabori planon deziratan de s-ro Dahl. La komitatanoj fariĝis: s-roj B. Beckman, Strängnäs, E. Dahl, Uddevalla, R. Lindahl, Karlskoga, O. Svantesson, Göteborg, kaj L. Åberg, Skövde.

Propono nro 2.

La federacia estraro proponis specialajn fak-sekciojn ene en SEF.

S-ro Julin, kiu havis la ordonon de sia klubo voĉdoni por la propono, petis sciigon pri la venonta organizo de la estraro. Ĉu ĝi ne estos tro peza, kiam ĉiu fak-sekcio tie havos reprezentanton?

S-ro Malmgren: Oni intencos krei reprezentistaron apud la estraro. La celo de la propono estas doni apogon al tiuj kiuj laboras por la praktika uzo de esperanto en siaj propraj medioj. Bezone ĉar tiaj grupoj ofte estas tro malfortaj por necesaj internaciaj taskoj.

S-ro Strönne: Valore estas aŭdi la opinion de la jarkunveno, ĉar revizio de federacia regularo ja estas sub laboro.

S-ro Støp-Bowitz informis ke en Norvegujo oni opiniis ke la esperantistaro ne devas dividi sin en fak-grupoj, sed ke la landaj asocioj donu eblecon al la membroj fondi kaj eniri en fakajn sekciojn sen speciala kotizo.

S-ro Lindén atentigis pri certaj formalaj malfacilaĵoj, kiujn oni spertos per fak-sekcioj, enhavantaj membroj, apartenantaj al malsamaj federacioj, ekz. SEF kaj SLEA.

S-ro Kihlberg kredis ke la fak-sekcioj faros plej grandan utilon kiel "remis-institucioj", de kiuj la federacia estraro povus preni helpon por certaj esploroj kaj pritraktoj.

S-ro Leijder same opiniis, sed s-ro Beckman timis ke oni ne sufiĉe atentis ke la fak-sekcioj devas esti internaciaj.

La jarkunveno decidis laŭ la propono de la federacia estraro.

Propono nro 3

petis decidon pri tia arango de la jarkunvenoj de SEF rilate al tempo kaj loko ke ili povu kunlabori kun aliaj organizoj.

La prezidanto sciigis, ke la federacia estraro deziris

ke la jarkunveno en tiu afero donu al la estraro plenan agadliberon.

S-ro Lindén (la proponinto) parolis por sia propono, sed s-roj Kihlberg kaj Dahl kaj precipe s-ro Ragnar forte argumentis por la pentekosto kiel la plej deca tempo por la jarkunvenoj de SEF.

Multaj parolantoj tuŝis la eblecon aranĝi kelkajn jarkunvenojn kiel skandinavajn aŭ nordajn kongresojn aŭ kiel kontakt-kunvenojn kun SLEA, sed la jarkunveno decidis transdoni la aferon por pritraktado kaj decido al la federacia estraro.

Venteto el Eŭropo.

La prezidanto de la federacio informis ke ĵus alvenis sciigo de s-ino Karin Hägglund, ke oni akiris novan send-eblecon por la restantaj donacpakajoj al hungaraj esperantistoj. Tiujn informojn la jarkunveno forte aplaudis kun salutoj al la laborema komitato, precipe sinjorinoj Hägglund kaj Alamo.

Propono nro 4

celis al pli forta proksimigo de SEF al la pacmovado kaj la homaranismo. La federacia estraro postulis malakcepton de la propono, indikante ke SEF jam apartenas al la organizo "Internacia kunlaboro por paco".

S-ro Lindén: Tiu membreco ankoraŭ ne donis post-signon. Esperanto ne nur estu hobia. Ni devas doni al nia movado enhavon. Ĉu la esperantomovado timas la justecon, al kiu sin apogas la homaranismo?

S-ro Åberg parolis por la vidpunkto de la estraro kaj rekomendis individuan aliĝon al pac-organizo.

F-ino Noll proksimiĝis al la opinio de s-ro Åberg rilate al valoro de individua kontribuo al la idealaj laboroj.

S-ro Julin petis ke la jarkunveno observu la ĵus faritan decidon je la propono nro 2.

S-ro Lindén volis ion alian ol fondadon de fak-sekcioj. Li volis kunlaboron kun la pacmovadoj por devigi ilin uzi esperanton.

S-ro Kihlberg opiniis ke la pacmovado bezonas esperanton kaj ke la esperanto-movado ankaŭ bezonas la pacmovadon, sed por la paper-aliĝo, pri kiu nun temas, li ne volis voĉdoni. Li proponis ke oni donu al la federacia estraro la taskon pritrakti je kiu metodo kaj vojo nia movado povu proksimiĝi al la pacmovado.

La jarkunveno decidis laŭ la propono de s-ro Kihlberg.

IEL

La ĉefdelegito de Internacia Esperanto Ligo IEL por Svedio, inĝeniero Karl Wästfelt, raportis pri la agadaro 1945 kaj akcentis la malfacilaĵojn havigi sufiĉan nombron de fak-delegitoj en Svedio.

Tre vigla debato ekflamis. Oni ne ŝatis la titolon "delegito". Pli bona estas la malnova "konsulo" kaj plej bona "esperanto-konsulo".

Post kiam estis sciigite ke la nombro de "konsuloj" tamen ĉiun tagon kreskas, oni metis la raporton al la aktoj.

SEI.

S-ro Karl Söderberg donis raporton de la laboro de Sveda Esperantoinstituto SEI, kaj s-roj Hult kaj Ragnar reklamis por la institutaj kursoj tiun someron en Amotsfors 6—7/7 kaj en Jursla (Norrköping) 14/7—5/8.

Al la interesa raporto de S-ro Söderberg ni revenos en nia septembra numero.

ELEKTOJ.

Post decido pri la jar-honorario al la estraranoj, same kiel antaŭe 400 kr. entute, la jarkunveno estis preta por elekto de federacia estraro.

Plena reelekto. Nur unu escepto. Ĉar oni deziris reprezentanton de TJO en la estraro, la jarkunveno metis s-ron Karl Erik Karlsson en la loko inter la anstataŭantoj, kiun ĝis nun havis s-ro Sigvard Håkansson.



Eldona Societo surprizas nin per riĉenhava ekspozicio de siaj libroj, kiujn nun parte elpakis f-ino Britta Adolfsson.

Per tio la prezido de SEF dum la nuna laborjaro estas Sro Ernfrid Malmgren, prez.

„ Jan Strönne, vic. prez.

„ Sune Ahlm, sekr.

„ Lennart Åberg, vic. sekr.

„ Bengt Skantz, kasisto.

f:ino Elisabeth Olsson, 1:a anstataŭanto.

sro Karl Erik Karlsson, 2:a anstataŭanto.

Sroj Nils Hedgren kaj Helge Nordkvist revizoroj kun f:ino Helmi Josefsson kaj sro Teodor Julin kiel anstataŭantoj.

*

Sub aldonita punkto en la tagordo oni debatis certan nombron de aktualaj demandoj, inter rili du, kiuj postulis formalan decidon.

Unue sro Åberg donis informojn pri la revizio de la regularo por SEF, kiu estas sub laboro. La jarkunveno postulis, ke tiu laboro estu finfarita kaj elektis por ellabori definitivan proponon srojn Strönne, Åberg kaj Julin.

Due oni debatis la ekonomiajn kondiĉojn por la gazetara servo de SEF. La jarkunveno deziris, ke tiu afero estu solvita per decido de la estraro post pritraktado kun sro Svantesson. Aliaj demandoj, kiujn la jarkunveno pritraktis, estis la organizoj "Amikaro de SEF" kaj "Amikaro de Esperanto". Sroj Ahlm kaj Skantz donis informojn pri la kreskanta laboro de estrara sekretario kiu estas rezulto de la nova propagando, ebligita per la kotizoj de la Amikaro. "Klopodoj por varbi ankoraŭ pli grandan amikaron estas necesaj kaj la kluboj povas atendi cirkuleron pri tiu grava afero."

Sro Strönne atentigis pri la decido de IEL, ke la esperanta mondkongreso 1948 estu en Malmö. "Tiu tamen ne estas provinca afero, sed grava tasko por la tuta lando."

Sro Stenström inaŭguris debaton pri esperanto-prelegontoj kaj pri la postuloj je ili, kiujn oni devas meti. Post la fino de la tagordo sro Strönne redonis la prezidantan frapilon al sro Malmgren petante ke la federacia prezidanto fermu la kunvenon.

Sro Malmgren turnis sin kun danko al la partoprenantoj, precipe al la eksterlandaj gastoj kaj al la funkciuloj de la jarkunveno. La eksterlandanoj kortuŝe respondis kaj la kunveno atingis sian finon.

LA KADRO ĈIRKAŬ LA JARKUNVENO.

Jam ni priskribis Bohusgården kaj nomis la bonvenfeston en la pentekosta vespero. Multe estas por diri pri ĉio bela kaj interesa, kion la urbo Uddevalla prezentis al ni, sed la jarkunvena laboro malhelpis nin ĝui tion kolektive, nur en disaj grupoj, kiuj ne plene raportis siajn travivaĵojn al ni.



La infanklaso de Dahl.

Anstataŭe ni nomos kelkajn el la gajaj partoprenantoj, kiuj metis siajn talentojn je nia dispono.

Jam estas menciita la organizanto Dahl. Estis ankaŭ kantisto, kantgvidanto kaj muzikisto Dahl, kaj ni ne povas nei al ni eltiri floron el unu bukedo, kiu estis prezentita al li. Sur la folioj de bukedo de polino ni povas legi:

Ĉien ĉiam sonas kanto
De ŝercema prezidanto
Ho kara mia diru nun
Kiel vi faras "pru tfu"-ton?
Kvankam vi ne estas "sorĉisto"
Tamen bona instruisto!
Enŝercis vi ankaŭ en niajn korojn
Senzorgajn tagojn, feliĉajn horojn
Akceptu de ĉiuj koregan dankon
Kaj instru plue Esperanton!!!

La fremduloj, kiuj estis niaj gastoj, estis ĉiuj viglaj kaj bonhumoraj, kaj inter ili estis mirinda procento de talentuloj, kiuj volonte aŭdigis sin kiel recitatoroj, kantistoj, parolantoj aŭ ŝercemuloj. Unue ni mencias nian francan samideanon sinjoron Dupuis. Senlace li estis preta en ĉiu okazo ekstari kaj same kompetente kiel ĉiuj aligi aŭ kapti la atmosferon per sia muziko aŭ kanto.

Ankaŭ inter la svedoj gasto estas nominda. S-ro Adamsson la reprezentanto de SLEA inter alie en sprita ŝerco donis sciigon pri la vere vera esperantisto.

Inter la kantistoj ni sukcesis noti s:inon Meta Jansson el Estonio, nun Borlängeano, kaj s:inon Leijder el Karlskoga. Recitatoroj kaj ŝercemuloj havis inter si tiajn eminentulojn kiel s-rojn Setälä, Stöp-Bowitz, Szilágyi kaj la viglegan s-ron Levi.

Du atombombfantomoj ankaŭ troviĝis inter la svedoj. Unue la sorĉisto Sam-Sam, alias nia federacia sekretario Sune Ahlm, kies lertegaj manoj kaj ŝercema lango aŭdeble estis ŝatata de junaj kaj malpli junaj. Due ni nomu la "La Fajrero" la ne malgranda grupo da esperantinfanoj de Dahl, kiujn oni povis kolekti en la somera urbo. La improvizita ekzameno, al kiu ili estis submetataj antaŭ la tuta jarkunveno estis same gaja kiel instrua. Eble oni pli korekte devus preparoli ĝin aliloke, ĉar ĝi tuŝas la plej severan parton de la jarkunvena laboro. Por reveni al "la kadro" denove ni finu per kelkaj linioj el la Szilagya tablokanto:

(Mel.: Flickorna i Småland.)

Post festeno, kanto, danco, sonoj de l' salut morgaŭ ŝute ni tributos al kongresdiskut, kaj post ĉio nin englutos mem la verda put; saĝofluo, alta kurso de la Institut.
Ho Uddevalla, Uddevalla, Udde-udde-udde-vall.
Flugis gaje, aŭtis ĝoje, ciklis ĉiu al jubileo en la urbo de amiko Dahl:
Uddevalla, Uddevalla, ho Uddevall.

AL LA SKOLTA ĴAMBOREO

S-ro Jean Couteaux skribas:

Oni scias, ke la skoltoj de la tuta mondo, 13 ĝis 17-jaraj, kunvenos la 9 de aŭgusto 1947 en grandega ĵamboreo, kiu okazos en Francujo, apud la vilaĝo Moisson, en la buklo de la riverego Seine situata inter Mantes kaj Vernon, kontraŭ la Roche-Guyon. Estas tie rava kampo, kie la arbaro ne estas tro densa por ĝeni la kampadantojn, sed sufiĉe por doni al ili la necesan ombron, kun la Seine tute proksima, kiu utilos por la ekzercoj de la skoltoj maristoj. Sumo da 45.000 personoj tie loĝos sub tendoj: 45 landoj sendos delegitarojn.

Por permesi al la junaj skoltoj interkompreniĝon, interpretistoj estos necesaj: unu por ĉiu fremda "trupo" da 35 personoj. Por la instruo de tiuj interpretistoj, en ĉiu provinco de la franca Skoltismo, konversaciaj kursoj por fremdaj lingvoj estas jam organizitaj: 45 el ili ekzistas por la sola Pariza Centro. Sed tio, evidente, ne sufiĉos, por ke la skoltoj sin komprenu unu la alian. Tial, ni konsilas multe al la francoj eklerni Esperanton, ĉar, fakte, ni scias, ke multaj fremduloj lernas nian lingvon, kaj pretiĝas por surporti la verdan stelon la unuan tagon de la ĵamboreo. Dum la unua tago, efektive, okazos en Moisson la kunveno de la skoltoj esperantistoj.

La ĉeĥoslovakoj kaj nederlandanoj jam skribis, ke ili havos inter si fortan proporcion da esperantistoj. La esperantista movado, oni devas tion koni, disvastiĝas en tiu momento laŭ grandega intenso. IEL informas nin, ke la aliĝoj ĵus ricevataj en Londono altiĝas por 1946 ĝis 6.071, anstataŭ 3.683 la 1 de marto 1945, kio antaŭvidigas ĉirkaŭ 15.000 internaciaj membroj por la fino de tiu jaro, anstataŭ 8.266 en fino de 1945.

Tial, ŝajnas ĝustatempe konsili al niaj amikoj, ke ili iru en la skoltajn mediojn por fari esperantajn kursojn. Estus bone, ke ili antaŭe akordiĝu kun la trupestroj, kaj, se eble, kun la provincestroj, mastroj sur tiu tereno. La ĝenerala skolta Direkcio opinias, efektive, ke ĝi devas restadi neŭtrala pri la solvo de la problemo de la internacia lingvo.

Dum kvar tagoj post la ĵamboreo, la kampadantoj vizitos Parizon, kaj poste, dum 15 tagoj, la fremduloj estos akceptataj de siaj provincaj amikoj, jen en Akcepta Kampejo, jen ĉe la loĝantoj.

Kiel kompreni tiujn junajn fremdulojn, kiuj apenaŭ scios balbuti kelkajn vortojn de franca lingvo, kaj interfratiĝi kun ili, se oni ne disponos esprimilon oportunan kaj facilan, kies studo postulos nur minimumon da tempo?

Se la provo de interkompreniĝo per Esperanto okazonta dum la estonta ĵamboreo sukcesos, ĝi alportos al la tutmonda junularo grandan instruon. Sed por ke ĝi sukcesu, estos necese, ke niaj skoltoj estu lernintaj nian lingvon sufiĉe bone, por ke oni povu ilin kompreni.

(El "Franca Esperantisto")

Sjung på Esperanto!

ESPERANTAJ KANTOJ

kostar endast 50 öre (+ 15 % oms. o. porto)

Genom en tillfällighet ha vi kommit över ett parti sångböcker innehållande våra vanligaste "allsånger" och förmoda de kommer att få en strykande åtgång, alldenstund vår förra svenska sångbok varit utsåld det senaste året.

Förlagsföreningen ESPERANTO

Fack 190 71

Stockholm 19

Postgiro 578

SOMERA UNIVERSITATO

Per belaj kaj enhavoriĉaj vortoj pri spertoj kaj espero en pasinto kaj estonto komenciĝis memorinda post-pentekosta semajno en Uddevalla. La agrabla turisthotelo de Föreningen Norden transformiĝis je ia nova republika, tiel demokratia, ke oni eĉ ne scias, kiu estis ĝia prezidanto. Oni parolis nur Esperanton en tiu lando, oni pensis Esperante kaj ŝercis, kantis, emfazis kaj supozeble ankaŭ konfesis en belsonora Esperanto.

Kvindek harmoniaj animoj sekvis la pretendoplenajn prelegojn, kies prezentantoj taksis ĝuste sian kompreneman publikon. Kvankam ne temis pri bagatelo: 4 prelegoj ĉiutage, diskutoj viglaj kaj pure esperanto-programo vespere. Krom ĉio la unua leĝo de la universitata republika estis: Parolu nur Esperanton! — kaj la maloftaj pekantoj tuj devis doni sian imposton al la republika ĉefpolicisto, s-ro Herbert Levi, por ke fine de la semajno 3 libroj estu ellotumitaj. Multaj "eksterlandaj" vortoj eĉ hazarde ne aŭdiĝis, oni songis eĉ en Esperanto kaj laŭdire eĉ la dorme parolantoj disaŭdigis sekretojn nur en Esperanto. Post la prelegoj ĉi-vespere okazis programo kaj ludoj, kies ĉefaj kontribuantoj estis la fenomenaj Einar Dahl, la sprithumora Støp-Bowitz, lia esperiga, juna samlandano, la norvego s-ro J. H. Rosbach. Ankaŭ la mirinde juna kaj admirinde ĉarma sepdekdujara f-ino Noll kaj la temperamenta, elokventa, deklamanta kaj ĉioscia V. Setälä el Finnlando estis konstantaj kontribuantoj al la vesperaj



Tutpaĝo esperantista en loka gazeto interesas Hungarujon (Szilágyi), Svedion (Adamsson) kaj Finnlandon (Setälä).

programoj, same kaj precipe la franca amiko, s-ro Roland Dupuis, kiu ĉiam estis preta por ludi, akompani kaj kanti.

Ankaŭ la aliaj prelegantoj kaj partoprenantoj donis kontribuojn, inter ili ni menciuj nun la belan kanton de s-ino M. Jansson kaj la pianludon de s-ino Atlas. Oni ne rajtas forgesi la patrine ĉarman prizorgadon de s-ino Sandell, la mastrino de la hotelo, kaj entute oni sentis dankon por ĉiuj, kiuj estis ĉirkaŭ ni.

La publiko konsistis el bonhumoraj diversnaciaj, la eksterlanda grupo kunmetiĝis el deksep membroj, en kiu grupo estis reprezentitaj ĉiuj nordaj landoj (krom Islando), Polujo, Francujo, Hungarujo kaj Germanujo. La intergenta paco estis modela.

Sed nun mallonge pri la prelegoj! Red. E. Adamsson dufoje donis gravajn konsilojn: la unuan fojon pri kulturtaskoj en la postmilita vivo, la duan fojon li parolis pri la kulturkonkurenco kaj pri ilia rilato al niaj taskoj. Lektoro Bj. Beckman kontribuis per prelego pri la problemoj — kvantaj kaj moralaj — de la historia instruado post la milito kaj per alia, tre bonhumora parolado pri vojaĝo al Nederlando. Li prezentis ankaŭ filmojn.

La populara milfarulo de la somera renkonto E. Dahl parolis pri la ebloj kaj devoj en la mondo de la paco.

Granda intereso kaj vigla diskuto sekvis la paroladojn de la federacia prezidanto, s-ro E. Malmgren, kiu



Margarethe Noll
el Köpenhamn.

parolis pri la movado dum la milito kaj pri organiza problemoj. Oni havis la impreson, ke ĉiu sentas la bezonon de laŭplana paraleligo de la diversaj movadoj.


F-ino Margarete Noll parolis unue pri la idealaj movadoj de Danujo kaj oni povis kun admiro konstati, ke ŝi, spitante sian aĝon estas aktiva en preskaŭ ĉiuj altruismaj movadoj. Ŝia alia prelego okupis sin pri kompreno (Esperanto), nekompreno (indiferenteco) kaj miskompreno. Fil. mag. Vilho Setälä parolis pri eblecoj de laboro en la postmilita tempo. Unu el liaj plej interesaj rimarkoj koncernis la internacian enciklopedian laboron, kie Esperanto estas apenaŭ malhavebla. Lia alia prelego, same kiel la riĉe muzikilustrita prelego de R. Dupuis pri la franca muziko, okupis sin priarto: t. e. pri la Artfotografado kaj pri ĝiaj esprimrimedoj. Ni vidis interesajn kaj belajn fotojn.

D-ro J. Stenström donis inteligentajn argumentojn pri la malfacileco de la instruado de nacia lingvo. La prelego de Jan Ströme, kiu estis legata de subskribinto pro la ne-antaŭvidebla foresto de la aŭtoro, okupis sin pri la atomenergia mondo kaj pri ĝiaj du "aŭ... aŭ", en kies optimisma ekstremo atendas tiom da taskoj la esperantistojn. S-ro C. Støp-Bowitz kontribuis per du prelegoj: pri la idealaj movadoj en Norvegujo dum la milito kaj pri mirindaĵoj en la zoologio. Ambaŭ prelegoj estis interesaj, la dua multkolora, tre instrua kaj samtempe amuza.

D-ro F. Szilágyi prezentis la evoluon de la naturrajtaj postuloj en du prelegoj, indikante la paralelojn kaj la diferencojn en la idearo de Zamenhof kaj Roosevelt. Lia tria prelego okupis sin pri psikologiaj konstatoj koncerne rifuĝintojn kaj pri tiuj problemoj, kiujn ilia reenkonduko en la vivon povas signifi. Lia lasta prelego pritraktis la pacismajn kaj socialismajn tendencojn en la esp. literaturo.

La sveda radio donis radioeĥon dum la semajno kaj mallongondan dissendon. La dankoj kaj varmaj esprimoj auditaj fine de la semajno de ambaŭ flankoj, parte de arangantoj kaj prelegistoj, parte de la ĉeestintoj plifirmigis la impreson pri harmonia, agrabla kaj bela, verda semajno.

F. Sz.



S-ro Støp-Bowitz el Norvegujo (dekstre) faris studviziton ĉe Kristineberg apud Fiskebäckskil, kie li trovis zoologiojn-kolegojn.

SOMERNOKTO

Av S s h r a d e r.

Den vackra och melodiösa sången "Sommarnatt" översattes under årets sammankomst på Bohusgården, och då den säkerligen inom flera klubbar kan användas som programpunkt, publicerar vi den.

Lumo de nokto somera ĉe mi
vekas penseton. Ekbrulas ebri,
kaj naskiĝas la amo al vi.
Ĉio nun krias pri vi, karulin.
Mi en dormanta la nokt, amatin,
flustras: "Mi amas vin".

Nuboj blanketaj sur blua ĉiel.
Birdoj forflugas en nokta la hel,
flugas ili al vi, mia stel.
Nun per sopiro pleniĝas la kor.
Kaj la naturo en malfrua hor
kantas: "Mi amas vin".

Nokton forigas radioj de lun,
kaj vian nomon reflustras mi nun.
Eble vi povas aŭdi min,
kaj ama flamo vekigis ĉe vi,
kaj mi esperas, ke vi kiel mi
kantu: "Mi amas vin".

Einar Dahl.

MORTIS †

Julio Mangada Rosenörn

Kun sincera bedaŭro ni sciigas al la tutmonda esperantistaro ke la bone konata kaj alte estimata s-ano sro Julio Mangada Rosenörn mortis en majo en sia domo en Meksiko, forrabita de sia sindona edzino s-ino Petita Saenzek kaj ilia filo, nia s-ano Ludoviko M.

S-ano Mangada laboradis por kompletigi Hispan-
Esperantan Vortaron de li mem komencitan antaŭ kel-
kaj jaroj; eble tio okazigis nervan aŭ ĝeneralan elĉer-
pon. La svedaj amikoj de la mortinto tutkore kondolencas.

J. Th. Carlén kaj Viktor Danielsson

Örebro Esperantosocieto perdis du el siaj membroj. La 4an de majo mortis nia ŝatata honora membro eks-
ĉeflaboristo J. Th. Carlén. La 16an de aprilo ni dum
kunveno gratulis lin pro liaj la saman tagon atingitaj
78 jaroj. Jam en 1904 li interesiĝis pri nia movado kaj
malgraŭ persistaj provoj de s-ro Ahlberg igi lin Ido-
isto, li restis al ni fidela kaj aktiva ĝis sia morto. Ni
nomis lin vivanta vortaro pro liaj grandaj vortprovizo
kaj memoro. Li aliĝis al ni en 1934 kaj deĵoris dum la
lastaj jaroj kiel nia tenejestro en maniero plej laŭd-
inda. Li restos en nia memoro kiel amiko trankvila kaj
bonkora. — Ĉe la enterigo kantis nia samideano s-ro
Palmrot kaj abundis florkronoj. — Ripozu li en paco!

Ankaŭ nia ŝatata membro Viktor Danielsson mortis
(la 9an de majo) en la aĝo de 70 jaroj. Li estis deĵor-
anta kiel kontoristo ĉe la ŝtata fervojo en la norda
Svedujo, sed kiel pensionulo li transloĝis en Örebro kaj
aliĝis al nia movado.

Li zorgeme studis la klubajn aferojn kaj donis sian
opinion kvankam li pro surdeco ne volonte partoprenis
la komunajn intertraktadojn. — Malfacile ni anstataŭ-
igos lin egalece. P.

Naskiĝis 10/5 46 filino Ingrid al Henrietta de Kers-
gieter kaj Fernand Roose, Brugge, Belgio. — Ni kore
gratulas.

Förlagsföreningens årsmöte



Bernhard Eriksson

Förlagsföreningen Esperanto upa höll årsmöte an-
nandag pingst den 10 juni 1946 å Bohusgården, Udde-
valla, under presidium av hrr Bernhard Eriksson, ordf.,
och Karl Wästfelt, sekr.

Styrelseberättelsen (som vi refererade å sid 50 i maj-
numret av Espero) godkändes, och styrelsen beviljades
full och tacksam ansvarsfrihet för 1945 års förvaltning.

Den uppgjorda balansräkningen pr den 31 dec. 1945,
slutande å 38.281 kr., godkändes, vilket innebär, att
1945 års vinst utnyttjades för att täcka 1944 års för-
lust och att det mindre överskott, 77 kr., som därefter
återstod, fördes i ny räkning.

Val av en styrelseledamot för två år efter hr Sune
Ahlm, som stod i tur att avgå, resulterade i omval.
Vid val av 1 styrelseledamot för ett år efter hr Bern-
hard Eriksson, som anhållit att få avgå, utsågs hr
Bengt Skantz.

Sedan omval skett av suppleanter och revisorer är
föreningens ledning för löpande år följande.

Styrelse: hrr Wästfelt, Ahlm och Skantz med supp-
leanter: hrr Sune Kjellander och Birger Gerdman. Re-
visorer: Hrr Nils Hedgren och Helge Nordkvist med
suppleanter: hrr Martin Eriksson och K. J. Moberg.

Till folksskollärare Einar Dahl och familjen Winberg
i Bengtsfors uttalades till dagens protokoll ett varmt
tack för det arbete och den frikostighet, som möjlig-
gjort för förlaget att utge den länge önskade läroboken
i esperanto för skolan.

Frågan om effektiviseringen av kontrollen över redo-
visningen från förlagets försäljningsombud väckte en
livlig debatt. Man uttalade sig för att få ombuden un-
der klubbarnas revision, men då detta var en SEF:s
angelägenhet nöjde man sig med att besluta, att för-
laget skulle komplettera sina redovisningsblanketter i
syfte att uppnå bättre kontroll.

Herr Leijder påpekade de försäljningsmöjligheter för
förlagets produkter som ABF:s studiecirklar erbjuder.

Innan årsmötet avslutades vände sig hr Strönne till
hr Bernhard Eriksson och framförde allas varma tack
för hans mångåriga och uppoffrande arbete och fram-
för allt för hans många goda initiativ. Talaren var
förvissad om hr Erikssons fortsatta intresse för före-
taget, ja, han räknade på den avgående förlagschefens
hjälp i fortsättningen.

Under starka applåder beslöt mötet taga detta tack
till dagens protokoll. Hr Eriksson avslutade mötet med
ett tal, vari han framförde sitt tack och gav uttryck
dels åt sin tillfredsställelse att få lämna ett hårt och
påfrestande arbete, dels åt den saknad han vid skils-
mässan ändock kände. Han var glad att ha kunnat
föra förlaget genom krigstidens påfrestningar och han
var glad att ungdomen nu trädde till för att föra ar-
betet vidare.

J.

Johan Hammond Rosbach:

MODERNIGO EN LA KAVERNO

El la densa arbaro venis Ŝton-Ŝtonid, maljuna viro preskaŭnuda. Ĉirkaŭ la koksoj li havis linkan felon, tio estis lia sola vestaĵo, eĉ la piedoj estis nudaj. Li havis belan barbon kaj densan hararon. Sur la ŝultroj li portis mortintan cervidon.

— Ho, ho! li laŭte ridis, estos ĝojo en la kaverno kiam la infanoj ekvidos mian cervidon! Ho, ho, estos odoro en la kaverno, kiam Ŝtonin pretigos la manĝaĵon. Ho, ho!

Kiam li atingis la grandan riveron Ŝtonej, li demetis la cervidon kaj eksidis. Li aŭskultis. La susuro de la venteto en la arbaro kaj la ondbatoj kaj muĝo de la rivero sonis en liaj oreloj kvazaŭ dolĉa muziko. Kaj jen la doloraj blekoj de la grupoj sur la marĉo.

— Ho, ho, la vivo estas bona, la mondo estas bela, diris al si Ŝton. Sed mi soifas! Kaj li remetis la cervidon sur la ŝultrojn kaj iris en la riveron. La torento estis fortega, sed li eĉ ne unu momenton hezitis — rekte antaŭen li iris. Kiam la akvo ĝisiris lian buŝon li trinkis, trinkegis. Post tio li daŭrigis — el la rivero — sur la marĉon. Ĉiu paŝo postulis multe da forto, ĉar la peza viro kun la besto sur la ŝultroj profunde eniĝis en la ŝlimo de la marĉo: ŝvap, ŝvap, ŝvap, diris la marĉo sub liaj piedoj. Kaj tiu sono estis agrabla al liaj oreloj.

— Ho, ho, vere bela estas la mondo kaj ĝia muziko, li diris, bedaŭrinde nur, ke la homoj ne povas mem fari belan muzikon, la mondo ankoraŭ ne estas sufiĉe moderna. Nur unu estas pli bona ol muziko, kaj tio estas manĝaĵo — kaj manĝaĵon la homoj povas bone fari. Bone, ke hodiaŭ mi prenis la klabegon, sen ĝi mi ne havus la cervidon nun, kaj cervida viando estas la plej bona. Feliĉa estas mi, kiu vivas en nia moderna tempo! Ni havas ŝtonajn ilojn. Kompatindaj homoj, kiuj vivis antaŭ ni — ili eĉ ne ekpensis pri tio, ke ŝtono estas uzbla! Ho, ho, ho! Sed mi deziras, ke ni povu eĉ pli modernigi nian kavernon!

Ŝvap, ŝvap, ŝvap — la marĉo estis longa. Sed nun li fine atingis la ŝtonan deklivon, kaj raŭkvoĉe li laŭte kantis dum li suprengrimpis al la hejma kaverno. La infanetoj aŭdis la voĉon de sia patro kaj rapidkrure kuris por vidi, kion li kunportis hejmen.

— Nu, etuloj — ĉu vi atendis?

— Ho jes, paĉjo — ni estas tre malsataj.

— Sed hodiaŭ mi havas cervidon, kaj cervido ne estas ĉiutaga manĝaĵo. Ĉu estas festo hodiaŭ? Ne. Do mi ne havas manĝaĵon por vi hodiaŭ. Ho, ho, Ho!

— Tamen estos festo hodiaŭ, paĉjo! Vi vidis, kiam vi venos hejmen!

— Kio estas, etuloj! Diru, diru!

Sed la infanoj ne diris.

Ekster la kaverno sidis Ŝtonin, la ĉarma edzino de Ŝton Ŝtonid. Ŝi feliĉe ridetis bonvenon al la granda viro kun la cervido.

Li salutis ŝin. Ankaŭ ŝi havis nur felon ĉirkaŭ la koksoj kaj estis cetere nuda. Sed ŝi ne havis la kutiman linkan felon. Ŝi havis belan neĝblankan koksfelon. Ŝton subite haltis: Ĉu la infanoj diris veron? Ĉu estos festo? Kio okazos? Kio okazos? Kial Ŝtonin havas la festan pelton?

Aperis subite en la kaverno Ŝtoner, la plej maljuna filo, kiu havis 20 jarojn.

— Ho, saluton, ĉu vi estas hejme! Kiu bona feliĉo kondukis viajn paŝojn al la gepatra kaverno? Ĉu vi estas la kaŭzo de la celebrotita festo?

— Jes, paĉjo! Mi ne estis kondukita ĉi tien per la bona feliĉo, sed mi mem kondukis la feliĉon ĉi tien! respondis Ŝtoner.

Ŝton staradis ekster la kaverno, la cervidon li ankoraŭ portis ŝultre. Li eĉ nenion komprenis, ĝis subite aperis apud Ŝtoner fremda juna knabino.

Ŝton ekkomprenis. Li rigardis ŝin, ŝian belan vizaĝon, ŝiajn longajn harojn kaj ŝian strangan koksfelon, kiu estis pli mallonga ol ordinare. Li ankaŭ rigardis la belan globetaron, kiu pendis de ŝia kolo sur ŝia brusto.

Li turnis sin al sia filo kaj demandis:

— Kie vi trovis ŝin? Kaj li kape montris al la junulino.

— Apud la maro.

— Ĉu apud la maro troviĝas homoj?

— Jes.

— Ĉu apud la maro la homoj havas tian koksfelon?

— Jes, estas felo de foko, besto, kiu vivas kaj en la akvo kaj sur la tero.

— Ĉu apud la maro estas tiaj belaj globetoj?

— Jes, estas sukceso, speco de malmola, diafana, fosilia rezino.

— Nu, la sukceso estas bela, la fokfelo estas bela, la knabino estas bela. Ho, ho, ho! Nu, filo mia — estas ja via afero.

— Dankon, paĉjo!

Kaj li kaj ŝi ekbrilis.

— Kiel vi nomiĝas? demandis la maljunulo.

— Dagny, ŝi respondis.

— Ĉu? Ĉu vi ne havas ŝtonan nomon?

— Ne, patro, ni ne plu vivas en la ŝtonepoko. Ni uzas metalajn ilojn, kiuj estas multe pli bonaj ol la forĵetindaj ŝtonaĵoj.

Ŝton iris en la kavernon kaj demetis la cervidon de sur siaj ŝultroj.

— Estos hodiaŭ edziĝfestoj en la kaverno, li diris. Jen la cervido, kiu estos festmanĝaĵo. Vidu — ankaŭ la forĵetindaj ŝtonaĵoj taŭgas por mortigi la rapidan cervidon, ho, ho, ho! Nun estos festo!

Ŝtonin komencis prepari la cervidon, kaj baldaŭ alloga odoro disvastiĝis en la kaverno.

— Ĉu vi estas feliĉa? demandis la maljunulo al sia bofilino.

— Jes, patro, mi volas kisi mian novan patron. Kaj ŝi flankenigis la longajn barbharojn de la maljunulo, kaj kisis lin, dum la etularo mire ĉirkaŭstaris.

— Kio estas tio? demandis la maljunulo.

— Ĉu vi ne scias? Ho ne, vi vivas en tro malmoderna tempo; vi certe ne scias. Estis kiso — la signo de la amo.

— Ĉu vi estas tiom terure modernaj ĉe vi? la maljunulo grumblis. Do certe ŝajnas al vi vera anakronismo veni ĉi tien al ŝtonepokuloj! Ho, ho, ho!

— Paĉjo, kio estas anakronismo? demandis la eta Ŝtonulin, metante la mallongajn brakojn ĉirkaŭ la hara kolo de sia patro.

— Ho, etulino mia, estas tro moderna aŭ tro malmoderna afero en tempo, al kiu ĝi ne apartenas. Se mi komencus uzi ilojn de miaj praaĵoj, estus anakronismo. Sed nun temas pri modernigo en la kaverno. Troa modernigo ankaŭ estas anakronismo, ekzemple se ni komencus uzi alumetojn anstataŭ niajn fajrigilojn.

La du gejunuloj ekridis.

— Ho, patro, vi estas mem vera anakronismo! Kiel vi povas paroli pri alumetoj — alumetoj ja ne ankoraŭ ekzistas! Memoru ke ni vivas dudek mil jarojn antaŭ la naskiĝo de Kristo! Troa modernigo certe ne estas bona. Imagu al vi, ke la homoj jam nun havus atombombon!

— Ni ne parolu pri tio. Ni estas sufiĉe feliĉaj. Troa modernigon ni ne volas en la kaverno.

J. H. Rosbach.

TJO-kunveno.

Belgujo invitas ĉiujn aktivajn TJO-anojn al internacia junular-kunveno en Blankenberge 2—5 aŭgusto 1946.

Anoncu vin al: Carlos Braet, Esscheboomstr. 1, Brugge, Belgujo. Klare indiku: adreson, sekson, naskiĝjaron, ĉu vi kunportos tendon, kaj ĉu vi iel povos kunlabori en la programo (kantado, muzikado, teatraĵo ktp).

Esperanto kaj radio

Dimanĉo 19.05 Bern (Svisujo). 47.28m. Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco. Paroladetoj de D-ro Privat. 25.34m kaj Praha (Ĉeĥoslovakujo). 1571m. Politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.

Lundo 20.00—20.30 Praha. 1571m. (kiel je dimanĉo). 21.50—22.00 Praha 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj pri la Esperanto-movado. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII. Skribu al Pola Radio, Koszykowa 8, Varsovio, petu programon.

Mardo Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo). 21.50—22.00 Moravska Ostrava (Ĉeĥoslovakujo). 325m. Informoj. Radio Moravska Ostrava.

Merkredo 16.15 Sofio (Bulgarujo) 352m. Parolado. Praha. (kiel je dimanĉo).

Ĵaŭdo Praha. (kiel je dimanĉo). Praha. 470.2m. (kiel je lundo).

Vendredo 20.30—20.45 B. N. R. O. Kortrijk (Belgujo). 202.3m. Parolado. Zender Kortrijk van de B. N. R. O., Rijselstr. 36, Kortrijk. 21.25 (?) EAJ 14 (Hispanujo). 200m. Kurso. Praha (kiel je dimanĉo).

Moravska Ostrava 325m. je 21.50—22.00 h. Sabato 18.30—18.45 (?) 3 SR (Aŭstralio). 238m. Novaĵoj. Nur je la dua sabato de ĉiu monato. 19.00—19.45 (?) PRA 2 (Brazilo). Paroladoj pri Esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco. Praca da Republica, Rio de Janiero. 20.00—20.30 PRI 3 (Brazilo). 49.75m. Paroladoj pri brazila vivo. "Brazila Kroniko". Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais. Praha. 1571m. (kiel je dimanĉo).

Klarigoj. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la hor sistemo Mezeŭropa sed demanda signo post la horo signifas, ke ni ne havas precizan informon pri la hor sistemo laŭ kiu oni kalkulis. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratul-leterojn kaj informojn pri ricevado.

*

Jen kelkaj komentarioj pri la programoj, La paroladeto de d-ro Privat daŭras 5 minutojn. Ĝin antaŭiras sciigoj en la germana. La stacio estas facile kaptebla kaj sufiĉe forta. — La Praha-disaŭdigoj ankaŭ estas anoncblaj jene, Praha sendas ĉiutage sur 25.34m je 20.00—20.30 informojn pri ... ktp. La sama programo estas sabate, dimanĉe kaj lunde sendata ankaŭ sur 1571m. — Laŭ informo de s-ro Roman Sako-wicz, Warszawa, la Pola Radio ne sendas en Esperanto. Mi kelkfoje provaŭskultis, la stacion mi facile trovas, sed neniun vorto esperanta aŭdiĝis. Mi admonas la legantojn skribi al la indikita adreso por peti programojn.

Radio Sofia estas somere nur trovebla en la vesperoj, tial mi ne estas tutcerta, ke la donita horo nun estas ĝusta. — Moravska Ostrava nepre devas havi raportojn de aŭskultintoj. Bone aŭdebla kaj interesa; la ordinara anoncisto anoncas ankaŭ esperante, sed, ho, kia akcentado, ĝi skrapas miajn verdajn orelojn: preskaŭ ĉiam oni akcentas la unuan silabon!

La programon mi tre ĝuas, kaj rimarku nun, ke tiu modela stacio havas same longan programon posemajne kiel la sveda radio pomonate.

La unuan ĵaŭdon en ĉiu monato Praha I, 470m, sendas "Esperantan Radio-revuon de Praha" kun novaĵoj pri nia movado. Ĝi estas speciale dediĉita al redaktoroj de Esp.gazetoj.

Ĵaŭde la 27an de junio parolis per la radio s-ro Vittek, kiu rakontis pri siaj impresoj el Svedio kaj ke li prelegis 90-foje dum kune 135 horoj. Fine li svede dankis al la svedaj s-anoj.

Ingvar Stenström, Box 13, Tingsryd. Tel. 31.

*

Radiostacio Praha informas, ke la mallongonda ĉiutaga radioprogramo sur ondo 49,92m estis plilongigita. Ĝi daŭras nun 30 minutojn kaj komencas multe pli frue ol ĝis nun. Krom tio ni atentigas, ke ekde la 6a de

LINGVA KOLONO.

Karaj Svedoj, mi ne konsentas pri "batalpometo" nro 2 en la Jan-a n-ro de SET. Ĝi estas utila, eĉ necesa. Jen kion diras Hodler en malnova "Esperanto" (Genevo). —

Tiu sono (Ĥ) ne estas tute internacia. (a) Tamen ĝin posedas la Hispana lingvo (j), la Germana (ch malmola) kaj la pli multaj Slavaj lingvoj (x en Rusa, ch en Pola). Ĝi do jam tial estus necesa por la transskribo de propraj nomoj. Sed ankaŭ ĉe kelkaj komunaj nomoj, precipe de Greka deveno, ĝi estas utila, ĉar ĝi permesas parte konservi la grafismon de la vortoj. Ekz. ĥemio (A. chemistry, F. chimie, G. Chemia, I. chimica, H. quimica, R. xemia) pli respektas la grafismon ol kemio, ĉar en neniun lingvon oni uzas K, plie ĝia prononco estas konforma al la Rusa, Pola kaj Germana. Same estas rilate al ĥaoso, ĥimero, ĥoloro, kie ĥi rememorigas la grafismon de la plimultaj lingvoj, dum la prononco estas Slava kaj parte Germana. Cetere, ĉe ĥolero kaj ĥoro la litero k ne povus anstataŭi ĥi pro kolizio kun la radikoj koler' kaj hor'. Post r, oni kutimis anstataŭigi ĥi per k, ĉar rĥ estas malfacile prononcebla. Ni tamen rimarku, ke en formoj kiel arĥipelago, arĥitekturo, monaĥo, ĥi pli respektas la grafismon ol k, kiu estas uzata en neniun lingvon. Domage estus tute forigi la sonon ĥ el nia lingvo, ĉar ĝi estas energia kaj majesta, kaj plialtigas la sonriĉecon de Esperanto. Plie, kiel dirite, ĝi estas tre utila por la ĝusta transskribo de propraj nomoj, precipe Slavaj kaj malnovgrekaj.

*

(a) Ni ĉi-okaze rimarku, ke la Esperanta alfabeto enhavas sonojn, kiuj ne estas tute internaciaj, t. e. ne apartenas al ĉiuj ĉefaj Eŭropaj lingvoj. Se oni volus ĝin konsistigi nur el tiuj sonoj, kiuj troviĝas en ĉiuj Eŭropaj lingvoj, oni devus elimini c, ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ. Tiam la alfabeto fariĝus tro malriĉa. La formo de multaj vortoj devus esti kripligita, kaj la lingvo estus pli unu-sona kaj malpli belsona.

Plie, mi rimarkigu, ke en la Angla la sono ek-z estas ofta, kaj neniel malfacile parolebla. Exact (ekzakt), examine (ekzamin). Ankaŭ exhale (ekz- aŭ eks-hejl), excel (ek-sel). La paroldifekto ĉe la Angloj estas alia: nome: li misdiras: egzamenon, egzakt!

La diro pri la Himno estas trafa, kaj mi petas anticipacion represon ĝin.

F. R. B a n h a m (Essendon W 5, Victoria, Aŭstralio.)

Malgranda Revuo nro 2/1946 estas havebla ĉe Eng-holm, Skolgatan 9, Ludvika, Svedio, enlande kr. 1:—, eksterlande 3 respondkuponoj.

La nova nro enhavas sep interesajn artikolojn, inter ili enkondukon en la pens-sistemo de la dana filozofo Martinus kaj priskribo en novela formo de la mezsveda kutimo saluti la printempon per fajro-festo la lastan tagon de aprilo.

Dansk Esperanto-Blad, som utgives av Esperantoföreningen för Danmark, har till redaktör utsett frk. Ida Christensen, Jagtvej 179, II, Köpenhamn Ö.

majo Ĉeĥoslovakio enkondukis someran tempon. La nuna stato estas jena:

Praha sendas ĉiutage sur 49.92m (ondo ŝanĝita 29/5-46) de la 21a ĝis la 21.30 horo de la mezeŭropa tempo s o m e r a.

La programoj lunde kaj ĵaŭde sur ondo 470 m je la 22.50 horo restas sen ŝanĝo.

Radio-Komisiono de ĈAE

Sveda radio

Esperanto-programo la 16 julio kaj 16 aŭgusto je 16,10 mezeŭropa normala tempo laŭ mallonga ondo 19,80 m.

Bonvolu represon en alilandajn esperantogazetojn.

H. C. Andersen: "La Malbona Suvereno", esperanta traduko de H. P. Frodelund, Lisesmindevej 4, Odense, Danio. 8-paĝa kajero. Prezo 1 respondkupono.

Tiu traduko estas presita sen uzo de supersignitaj literoj kaj cetere kun ortografio, kiu eble interesos niajn lingvistojn. Eble kolerigos ilin.

La enhavo de la malnova fabelo havas hodiaŭ mirigan aktualecon.

La Interligilo reviviĝinta. Dank al la klopodoj de la du fratoj Petro kaj Robert Filiâtre nova "Internacia Ligo por Esperanto en Poŝto, Telekomunikado kaj Transportoj, ILEPTT", anstataŭis la antaŭ-militan ILEPTON (Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt- kaj Telegraf-Oficistoj). La organon de la ligo "La interligilo" oni ne povas presi en Francujo pro manko de papero, sed la redakcio lerte utiligas la ligajn membrojn en aliaj landoj. La unua post-milita numero estas presita en Svisujo, la duan oni presas (por 15/7 46) en Svedujo, la tria kaj kvara estos presitaj en Bulgarujo resp. Nederlando. — Ĉiu poŝta telegraf-, telefon- kaj fervoj-oficisto kaj ankaŭ ĉiu tramisto kaj maristo estas invitita anonci sin kiel membro en la ligo. Tre valora estos tuja anonco kiel helpo en la malfacila nova starto. Plej simple oni faras tion per poŝtĉekmandato "Al Julin Ileppta ĉefdelegito, Stockholm", postgiro 1723. — La kotizo por 1945 estas 5 kronoj.

Postkongreso. En Borås kolektiĝis la esperantistoj multnombre la 16/6 ĉe gesinjoroj Knutsson por aŭdi ion pri la Uddevallatagoj. Raportis s-ro Szilágyi kaj s-ino Julin. La lastnomita estis intervjuita de Borås Tidning (vidu la n-ron la 20/6).

En Gotenburgo estis 20/6 kunveno de 65 partoprenantoj kun enkonduko de Einar Adamsson, kun salutoj de la 80-jara viena esperantisto L. Richter, kun interesaj salutvortoj de la pola samideano Zlotnik kaj K. Jookinen (Helsinki). S-ro Dupuis (Rouen) prelegis kaj ilustris siajn vortojn per pianoludo. Fine parolis s-ro F. Szilágyi (Budapest).

Argentina saluto. Inter la salutoj al la jarkunveno de SEF venis letero de Argentino tiel bele afrankita ke la koverton oni povis aŭkcie vendi kun 10 kr. gajno por la kongresa kaso.

El Hungarlando.

Dum la plej lasta tempo vizitis nin la gvidanto de sveda aŭtokaravano, kapitano Menzinsky, kiu estis komisiita por aĉeti hungarajn poŝtmarkojn aperintajn dum kaj post la milito, por filo de la sveda tronheredanto. La kapitano intencis aĉeti ilin en markkontoro de la poŝto.

Kiam oni informiĝis pri la komisiinto, la poŝto donacis belan memoralbumon kun hungaraj poŝtmarkoj kiel honorario-ekzempleron.

Eĉ per tiu ĉi modesta donaco oni intencis rekompenci la bonvolon de la sveda popolo, kiu klopodas malpliigi la mizerojn de la suferanta hungara popolo.

(El Sudhungarlanda Stelo)

En la hungara parlamento prof. Rutwid gvidas kurson en kiu partoprenas 8 deputitoj. En la parlamento 10 inter la deĵorantaj oficistoj parolas nian lingvon.

Italujo.

La Pastro Agostino Stellacci, de Napoli, kiu vizitis nian Stokholman kongreson, skribas kaj salutas la svedajn gesamideanojn kiujn li renkontis. Li nuntempe estas milita kapelano en la Hospitalo de la Ruĝa Kruco en Goia del Colle, Bari, kie li ankaŭ faras propagandon por nia lingvo.

Dum la militjaro 1940 li estis en Brazilio sur unu el la plej grandaj italaj ŝipoj. Li malsaniĝis kaj revenis hejmen. Li perdis dum la foresto sian amatan patron. Li ĉiam faris surŝipe esperantokursojn senpage inter la vojaĝantoj dum la vojaĝo inter Italujo—Brazilio, dum multaj jaroj.

Italo el Rogusa skribas, "Eble Vi ne povas kompreni la kortuŝon kiun ni italaj esperantistoj spertis en la kontakto kun la tutmonda Esp.movado post la longaj jaroj de silento. Ni italoj ne bonsukcesis ĝis nun eldoni tie ĉi Esp-gazeton, pro tio ni avide legas la alilandan, kun granda intereso, kaj speciale la svedajn gazetojn kun granda feliĉo."

Mond-Federacia Movado (Room 505, nr 343, S. Dearborn Str., Chicago 4, Ill., USA) sendas kontraŭ unu respondkupono sian flugfolion "Pac-planoj laŭ la karto", enhavantan la kialojn, kiuj parolas por kaj kontraŭ federacia mondregistaro.

Denaska Esperantistaro (Dua Bulteno) estas malgranda folio per kiu s-ro Robert Robertson (228 Alexandra Park R, London N 22) serĉas kolekti tiujn, kiuj mem estas denaska esperantisto aŭ havas infanon kiu estas aŭ de kiu oni atendas ke estos de infaneco esperantisto. Jam 108 el 17 landoj aliĝis al tiu rondo.

Bulgara Vizito en Svedlando.

En la monato Majo bulgara komerca delegacio venis al Svedujo. Por sia veturo tra la militdetruitaj landoj la delegacio uzis sian propran aŭtomobilan relvagonon. Kiel ŝoforoj dum la longa veturo, kiu iris trans Belgrad, Budapest, Vieno, Praha kaj Warsovio kaj havis longecon da pli ol 3000 kilometroj, deĵoras du bulgaraj lokomotivestroj, Hristo Pavloff el Tirnovo kaj Peter Vasileff el Sofia. Dum la deligitoj plenumas sian taskon en Svedlando la relvagono kune kun la ŝoforoj restas atendante en Trelleborg ĝis la hejmenforveturo de la delegitaro. Dum sia restado en Trelleborg la ŝoforoj, kiuj scipovas krom la bulgara, rusa kaj franca lingvoj ankaŭ esperanton, havigis al si multajn amikojn, speciale inter la esperantistoj de la urbo.

Grn.

La memoro de Carl Lindhagen.

En Stokholmo oni pritraktas proponon starigi je honoro de la mortinta urbestro Carl Lindhagen profesorecon de internacia jurscienco en la Stokholma Altlernejo. La esperantistoj multe ĝojas je tiu honoragado al batalanto por internacia lingvo.

Belga alvoko.

La XI-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista en sia ĝenerala kunveno de la 9-a de junio 1946-a

- 1) esprimis la deziron ke la neŭtralaj internaciaj Esperanto-Asocioj senprokraste kaj en reciproka toleremo pristudu la eventualan reunuiĝon de la neŭtrala internacia Esperanto-Movado;
- 2) esprimas la esperon ke tiu de ĉiuj sopirata unueco efektiviĝos plejlaste okaze de la unua postmilita Universala Kongreso;
- 3) instigas ĉiujn internaciajn Esperanto-Asociojn, neŭtralajn aŭ ne-neŭtralajn, pristudi senprokraste la starigon de tutmonda Esperanto-instanco kiu reprezentus ĉiujn esperantistojn senescepte;
- 4) decidis komuniki tiujn deziresprimojn al la Esperanto-gazetaro por ke ili veku ĝeneralan atenton kaj simpatian.

*Esperantister — Cyklister***CYKELVIMPEL**

(vit med grön bård och stjärna)

KR. 1.30

+ 15 % oms. o. porto

Vi ha lyckats komma över ett mindre antal vimplar till förkrigspris. Beställ därför omgående innan lagret (och sommaren) tar slut.

Förlagsföreningen Esperanto

Fack 190 71 Stockholm 19 Postgiro 578

Svenska Esperanto-Tidningen**La Espero**

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Redaktör: Eva Julin, Nytorgsgatan 15, 4 tr. ög., Sthlm.

Tel. 42 53 84.

Prenumerationspris: helt år kr. 4:— . Lösnummer 0:40. Utkommer en gång i månaden.

Annonspris: 20 öre pr mm. Korrespondensannons: 1:50.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Box 190 71, Stockholm 19. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a., post-adress: Box 19071, Stockholm 19 (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 30 75 15.) Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o. s. v.)

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgifter: Direkt ansluten medlem erlägger 7:50 kr. pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidning, erlägger 4:— kr. pr år. Förening med kollektiv prenumeration å tidningen för sina medlemmar erlägger för varje medlem en årlig avgift av 5:— kr. För familjemedlem är årsavgiften 2:— kr. Förening, som ej prenumererar kollektivt å tidningen, erlägger för varje medlem 2:— kr. pr år. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

A. M. de JONG:

LA PERFIDO

Pris inb.: Kr. 5:25 (+ 15 % för oms o. porto)

La Perfido estas rakonto pri kurioza amikeco inter knabeto, Merijntje, kaj vilaĝa "nigra ŝafo", Goort Perdams, ŝtelĉasisto kaj drinkulo. La verko donas supozeble fidelan bildon de nederlanda vilaĝanaro. Aparte menciindaj estas la priskriboj pri la vivo kampula kun ĝiaj naivaĵoj, bonhumoroj kaj, iufoje, krudaĵoj kaj vulgaraĵoj. Entute tre leginda libro kun bonaj preso kaj papero. Bela, ilustrita pergamensimila kovrilo.

Förlagsföreningen Esperanto

Fack 190 71 Stockholm 19 Postgiro 578

Korespondado.

Mi deziras korespondi kun la tuta mondo per pk. il. Gustav Jarneving, 25-jara poŝtovicisto, Tomtegatan 7, Borås (Svedlando).

Kursanoj en Brescia (Nord-Italujo) deziras korespondi kun svedoj. — Sendu kartojn aŭ leterojn al Fraŭlino Siri Linnander, Bergsgatan, Stockholm K, kiu tuj peras ilin al la kursgvidantoj.

Francisco LEVY, Montevideo 980, BUENOS AIRES, Argentino, deziras interŝangi poŝtmarkojn kaj esperantogazetojn.

Redigeringen av nummer 9 avslutas den 27 augusti.

YTONG

är det idealiska väggmaterialet för bostadshus och industribyggnader. Tack vare den stora isoleringsförmågan ger den fuktfria och sunda bostäder. Undvik trähusets brandrisk och höga underhållskostnader. Bygg i bättre klass genom att använda Ytong.

Bygg för framtiden ett högisoleringstenuhus till samma eller lägre pris än ett trähus.

YXHULTS STENHUGGERI A.B.**Hällabrottet**